

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 6, nummer 6 (36) maart-april 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Dumonata revuo de la

Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 6, n-ro 6 (36): marto-aprilo 2014

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe <http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html>.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Ŝajne ni ne havos veran vintron en Belgio. Nur dufoje ni havis leĝeran froston kaj unufoje iom da neĝo, precipe en Ardenoj. La vetero ĝenerale kondutas strange en la tuta mondo, ofte kun gravaj sekvoj por la homoj. Oni devas timi, ke, se tiu evoluo kontinuos, la problemoj ĉie pligraviĝos.

Kelkaj legantoj atentigis min pri erara informo en la numero de januaro-februaro, pli precize en la 'Plua historio de Esperanto' de Stöp-Bowitz kaj Isbrücker, kiuj skribis, ke D-ro Zamenhof tradukis la Novan Testamenton (el la greka) en Esperanton, kio estas malvera. Li tradukis la Malnovan Testamenton el la hebrea. Mi sciis tion, sed mi volis respekti la tekston de la du aŭtoroj. Cetere la teksto de la du aŭtoroj donas bonan superrigardon pri la frua historio de Esperanto.

Ekster la kĵutimaj rubrikoj vi trovos en tiu ĉi numero tre interesan artikolon pri du britaj sciencistoj kiuj malkovris la tiel nomatajn. salvestroloj, materioj kiu malhelpas la disvolviĝon de kancer tumoroj en la homa korpo.

Agrablan legadon !

Pieter Jan Doumen

Plua historio de Esperanto (9)

(Verdere geschiedenis van het Esperanto) (9)

La libroj de André kaj Remarque aperis en Esperanto samtempe aŭ preskaŭ samtempe kun la tradukoj en diversaj aliaj lingvoj kaj vendiĝis same rapide flanke de tiuj.

En diversaj landoj oni eldonis t.n. antolo-giojn, t.e. kolektaĵojn de tradukitaj fragmentoj el la literaturo de la lando. Aperis Belga, Bulgara, Ĉeĥoslovaka, Estona, Hungara, Kataluna, Pola, Sveda kaj Svisa antologioj. Ĉi tie oni devas menciigi ankaŭ la Fundamentan Krestomation de

Zamenhof. Tiu ĉi estis kolektaĵo de artikoloj pri la plej diversaj temoj, verkitaj de Zamenhof aŭ kontrolitaj de li, eldonita jam en 1903. Per ĝi Zamenhof celis doni al la esperantistaro pli grandan kolekton da tekstoj en modela lingvo kaj stilo.

Sed iom post iom kreskis ankaŭ la literaturo originale verkita en Esperanto. En la komenco oni verkis plej multe poemojn; bedaŭrinde ne ĉiuj estis same bonaj. En la Fundamenta Kres-tomatio troviĝas multaj poemoj de Zamenhof. La plej konataj estas: *La Espero*, *La Vojo*, *Al la Fratoj*, *Mia Penso*, *Ho, mia Kor'* kaj *la Preĝo sub la Verda Standardo*. Aliaj konataj kaj bonaj Esperanto-poetoj estas Grabowski (*La Taĝigo*), Julio Baghy (*Pilgrimo*, *Preter la Vivo*), Kalocsay (*Streĉita Kordo*), Edmond Privat (*Tra l'Silento*). Ankaŭ la humoristo Raymond Schwarz skribis versojn (*Verdkata Testamento*, *La stranga Butiko*).



La tombo de D-ro L.L. Zamenhof en Varsovio

La unua romanverkisto en Esperanto estis D-ro Vallienne, kiu verkis *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li ?*, kiun Kalocsay reviziis kaj reeldonis en 1938. Sekvis lin multaj talentoplenaj verkistoj. Ni ĉitu nur la plej konatajn kun iliaj plej multe legataj verkoj :

- Julio Baghy : *Viktimoj*, *Hura !*, *Sur sanga tero*.

- H.J. Bulthuis: *Idoj de Orfeo*, *Jozef kaj la edzino de Potifar*, *La vila mano*.

- Stellan Engholm : *Al Torento*, *Homoj sur la Tero*, *Infanoj de Torento*.

- Jean Forge : *Abismoj*, *Saltego trans Jarmiloj*, *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*.

- H.A.Luyken: *Pro Iŝtar*, *Stranga Heredaĵo*.

- John Merchant : *Tri Angloj alilande*, *Kompartinda Klem*.

- Raymond Schwarz: *Prozo ridetanta (humuraj noveloj)*.

Pri la plej konataj nunaj Esperantaj verkistoj kaj pri la Esperanto-literaturo oni povas legi en la

libro de L. Totsche: *De Paĝo al Paĝo*, kaj en tiu de M. De Waarde: *La Esperanta Literaturo*.

Ekzistas ankaŭ diversaj bonaj vojaĝpriskriboj kaj priskriboj de diversaj landoj kaj regionoj : Scherer: *Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo*; Bergman: *Tra sovaĝa Kamĉatko*; Welz: *Tridek Jarojn en la ora nordo*. La du lastaj estas tradukitaj.

Ĉi tie ni menciuj, ke jam ekzistis ellaboritaj Esperantaj fakvortaroj pri multaj fakoj, kaj ke sciencistoj komencis publikigi almenaŭ Esperantajn resumojn de siaj verkoj.

15. La stato de la Esperanto-movado en la mondo en 1948.


Eŭropo estas antaŭ ĉiuj aliaj la kontinento kun multaj landoj kaj multaj diversaj lingvoj. Tial ne estas strange, ke ĝuste en Eŭropo Esperanto estas plej multe disvastigita. En diversaj landoj de Eŭropo Esperanto spertis ankaŭ oficialan rekonon flanke de diversaj institucioj.

Britujo kaj Francujo estas la landoj kie Esperanto estas plej multe disvastigita. Lokaj kluboj kaj delegitoj de U.E.A. troviĝas en ĉiuj pli gravaj lokoj, kaj multaj kursoj funkcias en ĉiuj partoj de la lando. Aliaj landoj, kie Esperanto estas preskaŭ same multe disvastigita, estas Nederlando, Ĉeĥoslovakio kaj Svedujo. Plue en Aŭstrujo la lingvo estis vaste konata kaj oficiale subtenata antaŭ la germana okupo de la lando.

Sed ankaŭ en aliaj landoj la lingvo faris bonan progreson, kaj estas kluboj kaj delegitoj en multaj lokoj, ekz. en Belgujo, Bulgarujo, Danujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Jugo-slavujo, Nervegujo, Polujo, Svisujo. En la ceteraj landoj, kiujn la germanoj okupis dum la lasta mondmilito, ekz. en Ĉeĥoslovakio kaj Nederlando, la esperantistoj sekrete laboris, kaj tuj post la liberigo la movado vigle reekfloris.

En Rusujo certe ekzistas multaj esperantistoj, sed pro la politikaj cirkonstancoj en la lando ili ne havas multan kontakton kun la cetera movado. En Germanujo la naziista reĝimo tute detruis la movadon.

Azio. Japanujo estas ĉi tie la lando kun la plej forta Esperanto-movado. Kluboj kaj delegitoj ekzistas en multaj lokoj, kaj oni vigle propagandas. Antaŭ la lasta milito la movado kreskis ankaŭ en Hindohinujo kaj Nederlanda Hindujo. En Ĥinujo, Hindujo kaj la ceteraj aziaj landoj



ekzistas nur izolaj esperantistoj aŭ grupetoj.

Afriko estas la nigra kontinento, ankaŭ rilate al Esperanto. En Egiptujo kaj Moroko la movado forte kreskis post la lasta milito. En Alĝerio kaj Sud-Afriko estas kelkaj esperantistaj grupoj, cetere nur izolaj esperantistoj.

Ameriko. En Norda-Ameriko la angla lingvo estas ĉie parolata, tial oni ne tiel sentas la bezonon de internacia lingvo, kiel en Eŭropo. Tamen en Usono Esperanto estas relative bone disvastigita, kaj kluboj kaj delegitoj troviĝas en multaj lokoj. En Hollywood (Holivudo) oni faris kelkajn filmojn kun parte Esperantaj dialogoj.

Kiel la angla en Norda-Ameriko, tiel la hispana en Suda kaj Meza Ameriko estas parolata sur vasta teritorio en ĉiuj ŝtatoj escepte en Brazilo, kie oni parolas la portugalan. Ĝuste tial Brazilo estas la Sud-Amerika lando kun la plej forta Esperanto-movado. En tiu ĉi lando Esperanto atingis ankaŭ kelkajn oficialajn rekonojn, tiel oni ekzemple eldonis poŝtmarkojn kun Esperanto-taksto. Plue estas relative bona Esperanto-movado en Argentino. En la ceteraj sud- kaj mez-amerikaj landoj la Esperanto-movado estas malforta.

Oceanujo. Ankaŭ en tiu ĉi mondparto la angla lingvo estas preskaŭ ĉie parolata, tamen ekzistas kelkaj kluboj sur la kontinento, kaj estas delegitoj en la plej gravaj urboj. En Nov-Zelando la movado estas relative forta kaj bone organizita. Ankaŭ en la insularon de la Suda Maro Esperanto penetris, sed ankoraŭ ekzistas nur kelkaj izolaj esperantistoj.

Dum la dua mondmilito I.E.L. bone laboris, kvankam mankis kontakto kun la landoj, kiujn la germanoj okupis. Tuj post la milito kaj la fondiĝo de la Unuiĝintaj-Nacioj-Organizaĵo (U.N.O.) I.E.L. komencis en ĉiuj landoj kolektadon de subskriboj por sendi petskribon al

U.N.O. pri la enkonduko de Esperanto ; el ĉiuj partoj de la mondo alvenis amasoj da tiaj subskriboj. Alia signo pri la kreskanta kompreno pri la signifo de Esperanto estas, ke en pluraj landoj, inter ili Francujo, Gallup-esploroj montris gravan plimulton por la enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo.

Laŭ Støp-Bowitz kaj Isbrücker

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Eperantoland)

Hungario – ‘Amplifiki’ denove en koncerto – ‘Amplifiki’ estas/-is la plej konata kaj plej populara Esperanto-ensemblo, famiĝinta ĉefe dum la IJK en Debrecen, Hungario en 1983. Ili estas pioniroj de la rokmuziko Esperanta, la



La rokmuzikgrupo ‘Amplifiki’

unuaj kiuj ekverkis kaj komponis originalajn kantojn utiligante nur la amatan lingvon internacian. Iliaj kantoj akompanis la vesperojn de nenombreblaj festantoj en multaj renkontiĝoj, IS-aj, IJK-aj, IJF-aj kaj aliaj. *Tute ne gravas* (1986) estis ĝenerale konata de la tiama generacio, kaj pluraj el iliaj kantoj ankoraŭ nun estas ofte kantataj (*Sola, IS, Tute ne gravas*, kaj aliaj).

Ekde 1991-1992 pro la grandaj distancoj la grupo malaktiviĝis, sed dum la IJK en Veszprém, Hungario en 1998 la (ne tute) hazarde ĉeestantaj membroj Kim, Micke kaj Bertil – en la fino kompletiginte per JoMo – donis spontan, brue sukcesan, memorindan koncerton.

‘Amplifiki’, la historia esperanta rokgrupo, rekuniĝos sursceneje en aprilo dum IJK-2014 en Castelsardo, insulo Sardinio, Italio!

Pluraj anoj de la historia grupo faris sukcesan unuopan karieron en Esperantujo. Dekkvin jarojn post la lasta koncerto ‘Amplifiki’ denove rekuniĝos okaze de la ĉi-aprila Internacia Junularo Festivalo en Castelsardo. Kim J. Henrikson, Bertil Wennergren, Micke Englund,

Martin Wiese, Aline Boulet kaj Isabelle Roma, la ses originalaj anoj de ‘Amplifiki’ pretas denove koncerti kaj zorgi pri bonetosa nokta amuzado.

Pro la nesimpla alveturebleco de la Festivalo/koncertejoj multaj esperantistoj esperas, ke la organizantoj sukcesos aranĝi rektan elsendon de la koncerto per interreta televido, aŭ minimume fari bonkvalitan registraĵon de la historia koncerto.

<https://eo.wikipedia.org/wik/Amplifiki>

<https://www.gqcebook.com/Amplifiki>

Lázlo Silvási

Belgio – *Tago de la Flandraj Ardenoj* –

La Flandraj Ardenoj estas la nomo kiun oni donis al monteta regiono en la okcidenta parto de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk. Per la Tago de la Flandraj Ardenoj, kiu okazos dimanĉon, la 27-an de aprilo 2014, la lokaj naturasocioj volas konatiĝi la naturriĉecon de sia regiono al plejble granda publiko. Sed la Flandraj Ardenoj ankaŭ riĉas je kulturo. Pro tio ni, la membroj de La Konkordo, de Kortrijk, volas kombini la organizadon kun vizito al tiu interesa kultura ero de la regiono.

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze je la 9-a la arbaran rezervejon ‘Steenbergse Bossen’ en Zottegem. Rendevuloko : centro de Sint-Goriks-Oudenhove (Kruiswaterplein)

Tagmeze ni manĝos nian piknikon kune kun la aliaj partoprenantaj grupoj en la naturcentro ‘De Helix’ (Hoogvorst 2, Gerardsbergen).



Panoramo de la Flandraj Ardenoj

Posttagmeze ni veturos al Velzeke (Zottegem), kie ni vizitos je la 14h30 la Provincan Arĥeologian Muzeon (adreso: Paddenstraat 7) sub gvido de loka ĉiĉerono. Velzeke estis dum la gaŭla-romia erao kruciĝo de gravaj romiaj vojoj.

Por la tuta tago ni petas kotizon de € 4. Ebla profito iros al la Naturfonduso Flandraj Arde-noj. Ne prokrastu vian aliĝon jam nun per la ret-adreso : piet.glorieux@gmail.com .

Nederlando –*Mesaĝo de nia prezidanto*–

"Kio estas Esperanto ? " Jen la neevitebla demando, al kiu ĉiu esperantisto devas ade respondi, ĉu en disaj konversacioj, ĉu en la privateco de la propra cerbo. Ni ĉiuj konas diversajn pretajn formulojn – "lingvo internacia", "lingvo neŭtrala homa", "dua lingvo por ĉiuj," ktp – tradicie uzatajn por tiaj kla-rigoj. Komence de la jaro 2014 eble venis la tempo rigardi la aferon el iom pli radikala vidpunkto. "Lingvo kun interna ideo", tiel Zamenhof priskribis nian aferon. Sed eble pli trafa estas la iama propono de Helmut Welger, ke temas pri "ideo kun interna lingvo". Ideo samtempe pli vasta kaj pli intima ol gramatiko, ĉar ĝi koncernas nian identecon – nian homan eston. Laŭ tiu vidpunkto ni disvastigas unue kaj ĉefe ne lingvon, sed homaranecon. Temas pri la sento kaj sperto, ke oni nun aktive parto-prenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne sim-ple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kun-konstruanto. Tiun senton dividas sendube dek-oj da milionoj da homoj tra la mondo : inter ili multaj apenaŭ (aŭ neniam) aŭdis pri Espe-ranto ; multege malpli eklernis ĝin. Ili estas tamen en profunda senco niaj samideanoj. Por fariĝi amasmovado ni devas do lerni paroli kun ĉiuj homoj kaj ankaŭ lerni aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero : ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto ke UEA jam de 65 jaroj emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo, sed ni ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj. Tio signifas ankaŭ por "daŭripova estonteco" – koncepto kiu plivastigas la homaranecon por inkluzivi ĉiujn samplanedanojn, homajn kaj aliajn. Ke daŭripova mondo devas esti ankaŭ homaraneca mondo, kion verŝajne neniu el ni pridubas.

Tamen, kiel evolui en tiun direkton ? Jen defio, kiu nun okupas registarojn kaj neregist-araĵn organizaĵojn tra la mondo, kaj devas pensigi ankaŭ nin. La ĉi-jara Universala Kongreso en Bonaero (Argentino) invitas al dialogo ĉiujn aktivulojn labori per

BOUW EXPO TEGELEXPO MIX-BETON BOUWMATERIALEN
DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT, EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKENI
PAESEN
EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !
TEGELEXPO BOUWEXPO
☎ 011 66 55 54
☎ 011 66 55 50

Esperanto por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn. Ni devas fariĝi movado, kiu edukas homojn en tutmonda skalo pri la profunda rolo de la homaj lingvoj en la atingo de justeco socia, ekonomia, kaj eĉ ekologia. Kaj kie povas dialogi ĉiuj kiuj laboras por tia mondo. En tia kadro ni ja rajtos kon-sideri nin amasmovado.

Mark Fettes, prezidanto de UEA

Francio – *Programo de Kastelo Greziljono* –

Jen nia programo ĝis septembro : 2014 :
19.04-26.04 : FRINGOJ, grupoj de lernantoj kaj instruistoj
26.04-04.05 : PRINTEMPAS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj : gresillon.org/printempo
08.05-11.05 : Ĥorrenkonto de Interkant'
11.05-17.05 : Renkonto de rememoroj kaj rakontoj inter malnovaj esperantistoj kaj iamaj gastoj de Greziljono, gresillon.org/s1
29.06-06-07 : Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj kaj rezidejoj de renesancaj artistoj, gresillon.org/s2
01.08-09.08 : Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, SAT-antaŭkongreso, gresillon.org/s3
09.08-17.08: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, familioj, SAT-Infankongreseto, gresillon.org.s4
Telefono: +33-241.89.10.34
Retmesaĝo: kastelo@gresillon.org
aŭ prefere al bertox@free.fr .

Japanio –*Mesaĝo al la Virina Tago 2014* –

Estimataj kaj karaj gesinjoroj en la mondo,
Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virino Tago de UN 2014, Hiroŝimo, kiu konsistas el 23 organizaĵoj kaj la municipo Hiro-

ŝimo, salutas vin solidarece kaj elkore alvokas vin. En la 2-a de marto 2014, por la Internacia Tago de UN de la 8-a de marto, ni havos kunvenon por kunlabori kun saĝo kaj forto kaj antaŭenpuŝi la konstruon de socio por komuna partopreno de gevoj. Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hiroŝimo organizas kunlaboron por la heredigo de paca socio al la sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri ĉiujn fortojn por antaŭenpuŝi la komunan partoprenon de gevoj.

Pasis tri jaroj ekde la katastrofo de la unua atomcentralo de Fukuŝimo, administrata de la Tokia Elektropova Kompanio (TEPCO).

"En kia situacio vivas la infanoj de Fukuŝimo post la katastrofo?" estas la ĉefa temo de la Tago de 2014, dum kiu ni pensos pri la nutraĵo kaj la estonteco de niaj infanoj.

La registaro diris, ke "la malpurigo per la radioaktivaj substancoj ellasitaj sekve de la akcidento de la atomcentralo kaŭzis la plej seriozajn kaj malbonajn problemojn el ĉiuj malpurigoj de la medio". Kaj ankoraŭ nun la infanoj en Fukuŝimo ne povas ludi libere eksterdome. Ili vivas kun timo de ĉio kio estas tuŝebla, manĝebla kaj eĉ spirebla... Kaj pli granda estas la timo de interna radiado...

Ni respondecas pri riĉa kaj sekura estonteco por la infanoj. Okaze de la Virina Tago ni pri-pensas, kiel agadi por la estonteco de niaj infanoj.

Bonvolu doni vian opinion pri la estonteco kiun ni transdonu al la infanoj. Vian mesaĝon ni ekspozicias en du konvenejoj de la urbo.

S-rino YOSIDA Mariko, prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2014, Hiroŝimo, Japoanio

Usono – Esperanto en la usonaj lernejoj –

La registaro volas plibonigi la instruadon. Tre bone, se tiu "ŝanĝo" ne estas simple celita kiel pure signifa fanfaraĵo. Tial mi reko-mendas serioze provi la eksperimenton enkon-duki Esperanto-instruadon en la lernejojn de ĉiuj specoj (infanĝardenoj, publikaj lernejoj, porinstruistaj lernejoj, integrigaj kursoj por plenkreskuloj ktp. dum limigita tempo (ekz. dum unu jaro, eĉ nur dum duona jaro), kaj kompari la rezultatajn efikojn kun la klasoj sen Esperanto.

Tiaj eksperimentoj jam estis faritaj en diversaj landoj kaj ĉiam kun sukceso por Esperanto. Rigardu la nuntempajn provojn per "Springboard to Languages" ("Lingvolanĉilo"), ekz. en Britio.

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

hechtel@kbc.be

Vi estus surprizita de ilia efikeco – kaj vi samtempe montrus vian volon meti flanken koloniigan arogantecon (kaj aserti kiel memkompreneble, ke unu miliardo da personoj sur la tero parolas la anglan...) – kaj sen aŭskulti konsilantojn, kiuj mem ne havas ajnan imagon pri la Esperanta kulturo kaj ĝia efiko al la plilarĝigo de la horizontoj. Kaj finfine mi devas diri ke vi gajnos eĉ pli, ol vi investis, ricevante en viaj manoj malmultekostan rimedon por akiri tiom pli da influo.

Kiam mi pensas pri la devige malŝparita tempo por atingi mian nunan nivelon de la angla, dum mi dediĉis malpli ol unu jaron al la lernado de Esperanto pere de kaseda kurso, kelkaj libroj kaj la interreto – kompare al la 9 jaroj da studo de la angla lingvo en la lernejo kaj la senfina lingva torturado – , mi sentas, ke mi estis trompita : la angla estas simple naŭ-zege parolebla kaj havas duoblan vortaron kiel ekz. la franca. En Ĉinio, malgraŭ ĉiuj klopo-doj, eĉ en kvarstelaj hoteloj preskaŭ neniu povas flue paroli la anglan, kiel la ĉiea cerbo-lavado implicas. Estas klare al mi, kial ekzistas tiom da rezisto kontraŭ Esperanto ĉe la angla-lingvuloj, ĉefe la usonanoj : pro tio ŝuldas ilia memkompreno kiel monda superpotenco.

Salvestroloj : bona paŝo antaŭen !

Salvestrolen : flinke pas voorwaarts !

La malutilaj akcidentoj de la kutima terapio kun ĉelvenenoj kaj radiaktiva surradiado – i.a. la fakto ke ili trafas ankaŭ sanajn ĉelojn – konsistigas unu el la plej grandaj problemoj en la lukto kontraŭ kancero.


Tial la sciencistoj jam de multaj jaroj serĉas rimedon aŭ metodon kiuj protektas la sanajn ĉelojn, kaj instigas kancerĉelojn neniigi sin. Antaŭ nelonge oni malkovris substancojn nomatajn salvestroloj – kiuj realigas tion en

natura maniero. Sed ili apenaŭ troveblas en 'ŝprucitaj' legomoj kaj fruktoj.

Tiuj salvestroloj (kun la radiko de la latina vorto 'salvare' = savi) troviĝas en legomoj, fruktoj kaj herboj, sed preskaŭ nur en bio-produktoj kaj, koncentritaj, en nutrosuplemen-toj faritaj el ili.

Tio ankoraŭ ne estas trarompo en la lukto kontraŭ kancero, sed granda paŝo antaŭen.

Ne pensu, ke oni povas nun sukcese ataki plenkreskan kancertumoron, ĉar kancero estas multe tro komplika procezo en kiu tro multaj diversaj kaŭzoj ludas rolon. Estus eraro pro tio interrompi necesan terapion. Por ĉiu ebleco operacie forigi tumoron, oni devas esti danke-ma. En medicino ne ekzistas mirakloj kaj ankaŭ ne miraklaj rimedoj. Sed fojfoje la



Prof. Dan Burke kaj Prof. Gerry Potter

sciencistoj trafas miraklon en la naturo, kiel la malkovro de la salvestroloj. Ilia efikeco sur tumorĉeloj en cerbo, mamoj, ovarioj, prostato, testikoj, dika intesto kaj pulmoj estas pruvita. Ankoraŭ ne okazas grandskalaj klinikaj studoj. Unu el la problemoj estas la kosto, kaj oni ne povas patenti naturajn plantsubstancojn.

La salvestroloj tamen malfermas enormajn perspektivojn. Ili ankoraŭ efikas, kiam kancerrepuŝantaj antioksidantoj malsukcesis kaj ĉeloj tamen degeneras. Ili povas preventi, ke antaŭkanceraj ĉeloj definitive evoluas al tumor. La ĝis hodiaŭ konataj rezultatoj de kromaj terapioj per salvestroloj estas kuraĝigaj, kaj ĉio montras, ke ili estas idealaj por post-terapio en kazo de malicaj tumoroj, se eble eĉ pli ol prevento.

Ĉio komenciĝis antaŭ dudek jaroj en la universitato de Aberdeen (Britio), kie profesoro de farmokologio Dan Burke kaj liaj kunlaborantoj malkovris proteinon – enzimon kun la kodonomo CYP1B1 – kiu troviĝas nur en homaj kancerĉeloj, sed ne en sanaj. Oni povas do ankaŭ konsideri tiun enzimon kiel tumor-montrilon.

Post sia nomumo en la universitato de Montfort en Leicester (Britio), prof. Dan Burke konatiĝis kun kolego Gerry Potter, klinika kemiisto kaj eksperto pri la evoluigo de kancermedikamentoj.

Plulaborante kun la malkovro de la enzimo CYP1B1 de Burke, Potter disvolvis sintezan rimedon, kiu estis tiel transformita de la enzimo CYP1B1 en la kancerĉelo, ke ĝi kaŭzis opoptozon – la sinmortigon de la ĉelo. Potter kaj Burke ne haltis tiam. Pli grava, li rezonis, ol la scio, ke multaj homoj disvolvas kanceron, estas malkovri, kial ankoraŭ pli da homoj ne disvolvas kanceron. Kaj ĉar apoptozo – la sin-mortigo de la kancerĉeloj – estas natura fenomeno, ili demandis sin, ĉu en la naturo – kaj pli precize en la nutraĵoj – ne estas mate-rioj, kiuj ne malsanigas la sanajn ĉelojn, sed kiuj interne de la kancerĉeloj estas tiel transforma-taj de la enzimo CYP1B1, ke tiuj ĉeloj nenii-gas sin. Ĉar ili evidente mankas en niaj nun-tempaj nutraĵoj, tio povus esti unu el la kla-rigoj por la enorma pliiĝo de kancero dum la lastaj jardekoj. En ĉiu sana homo eltrakiĝas ĉiutage sanaj ĉeloj, kiuj en bone funkcia organismo nenii-gas sin mem. Kio evidente okazas nun ĉiam malpli.

Se mallongigi longajn eksplikojn : ambaŭ profesoroj malkovris serion da materioj, kiujn plantoj en la naturo kreas por protekti sin kontraŭ ŝimaĵoj, bakterioj, virusoj kaj UV-radioj, kaj kiu ankoraŭ efikas, kie la kancer-repuŝantaj antioksidantoj malsukcesas, kaj la ĉeloj jam estas degenerintaj aŭ survoje fari tion : la salvestroloj estis malkovritaj.

La salvestroloj aperis troviĝi precipe en la ŝelo, la semoj, kaj la ekstera flanko de la radi-koj de la plantoj, sed evidentiĝis ĉeesti mal-multe en la kutimaj legomoj kaj fruktoj el la ĉiovendejoj. Tio estas logika, ĉar ili trapasis traktadojn per insekticidoj, fungicidoj (kiuj mor-tigas ŝimaĵojn) k.t.p. Kaj ĉe tiumaniere traktitaj plantoj, la naturo apenaŭ povas fari sindefendantajn salvestrolojn. Por tiu kiu ankoraŭ dubas pri tio : bio estas pli sana.

Per selektado kaj plibonigado de la plantoj, rafinado kaj prilaboro post la rikolto aŭ pluko granda parto de la salvestroloj perdiĝas. Tiu donas al legomoj kaj fruktoj amaran kaj/aŭ akran guston kaj malklarigas sukojn kaj aleojn. Kaj tion la konsumantoj plej ofte ne ŝatas : ili prefere manĝas dolĉan ol acerban pomon, prefere bruselbrasikon sen amara gusto, prefere helan fruktosukon kaj klaran olivoleon. Tamen "amara en la buŝo" sanigas ne nur la koron !

‘Ŝprucitaj’ nutraĵoj entenas krom tio ankaŭ restojn de kemiaj mortigaj rimedoj, kiuj finfine favoras kanceron. *Test-aankoop* trovis tiajn restojn en 8 el la 10 specoj de normalaj fruktoj, jes en malgrandaj kvantoj, sed kiuj stapliĝas en nia organismo.

Unuflanke per la kutimaj nutraĵoj ni konsumas ĉiam malpli da kancermortigaj salvestro-loj, kaj aliflanke ĉiam pli da nocaj reziduoj. El tio ni devas konkludi, ke ni devas manĝi multe pli da fruktoj kaj legomoj, ol ni ĝenerale kutimas kaj kiel eble plej ekologiaj !

Por tiuj, por kiuj en la praktiko tio ne eblas, aŭ kiuj kredas, ke ili bezonas pli, ekzistas nuntempe nutraĵsuplementoj kun forta koncentriĝo de salvestroloj el ekologiaj fruktoj.

La lukto kontraŭ kancero estas multfronta lukto. Per la malkovro de la salvestroloj nova fronto, aŭ pli bone dirite, tre malnova fronto remalfermiĝis !

W.J. Duckaert, el ‘Maar natuurlijk !’

Nia rakonto : Malagrabla viro (3)

Ons verhaal : Een onaangename man (3)

En la loĝejo de la angulo restadas familio el Zaandam, kiu alvenis hieraŭ. La viroj, tre longaj, en perfektaj blujaj vestaĵoj kun nigraj kravatoj kaj blankaj subkravatoj ; la virinoj en nacia kapuĉo kaj kun nigraj dentoj. Ili jam trinkas kafon kaj lasas sin informi pri la multaj sciindaĵoj far la kafejestro, kiu permesas al si la liberecon resti staranta en la pordo. Kontraŭ unu de la fostoĵoj, apogante sin sur bastonon, staras invalida viro, ne vera almozulo, kiu tamen atendas almozojn, unu el tiaj senmortu-loj, ĉiam same maljunaj kaj kriplaj, kiujn la plej maljunaj harlemanoĵ jam ĉiam vidis tie.

Iuj suspektas, ke li estas ia spiono, kion mi ne kredas. Sed se li estus unu, li estus tie nur por povi rakonti al siaj genepoj, kiamaniere la avoj elspezas sian monon en ‘La Arbaro’.

En tiu situacio restas ‘La Arbaro’ ĝis la dek-unua. Tiam alvenas la avangardo de la harle-maj promenantoj. Ili ĉefe estas personoj, kiuj, ligitaj al sia profesio aŭ butikoj dum la ses ceteraj tagoj, havas dimanĉe la plej grandan apetiton. Estas malgrandaj butikistoj kun longaj frakmanikoj, librotenistoj kun vafloketoj en la oreloj, metiistoj kun altaj ĉapeloj, longaj bas-koj kaj longaj lumboj, ĉiuj kun siaj edzinoj kaj filinoj, vestitaj tri gradojn super sia rango, aŭ esceptakaze kun siaj filoj, kiam tiuj ĉi ne sukcesis konkeri bonan

lokon en la mondo kaj hontas pri tio. Inter ili estas malgrandaj floristoj, skribistoj de sekretarioj sed se tio ne estas la kazo, oni povas esti certa vidi patron kaj filon antaŭenpaŝi kun la samaj rotangaj promenbastonoj. Cetere oni jam nun rimarkas ian junan viron el pli alta klaso, ĉu notariskribisto aŭ supernombrolo¹ en la gubernio Nord-Holando, kiu, ĉar li ne sciis kiun viziti post la preĝejtempo, nun iris al Stoffels kaj, mirante, ke li renkontas tie ankoraŭ neniun el siaj konatuloj, amuzas sin per la hundo de la kafejestro, kiu per sia ĉarma afableco pruvas, ke la sinjoro estas regula gastulo.



La urbodomo de Harlema

Inter la unua kaj duono ĝis la dua sekvas lin la dignaj loĝantoj de la urbo. La fabrikisto kun sia familio, la notario kun sia familio, la libro-komercisto kun sia familio kaj la mondumaj infanoj de la pastoro sen siaj gepatroj. Nun ankaŭ venas la floristoj de la Malgranda Arbaro kun edzino kaj infanoj. Plue oni rimarkas tie fratinojn en siaj unuaj vualoj, kiuj iras promeni kun siaj fratoj en iliaj unuaj frakoj, esperante renkonti aliajn fratinojn en vualoj kaj fratojn en frakoj, kaj iam kaj iam unu solan veturilon, kiel ekzemple la kariolon de la kuracisto, kiu faras veturrondon kun sia edzino per sia plej bona jungitaro kaj jam renkontas la ĉareton de la cerealvendisto, kiu ne pagas plezurmonon ; plue la *demi-fortune*² de malgranda rentulo, sed ankaŭ jam la brilanta lakitan veturilon kun rapidaj nigraj trotuloj kun blankŝnuraj bridoj de riĉa makleristo, kaj la rajdĉevalon de la filo de la pensionatestro ; la tuto zigzagata kaj preterirata de amsterdamaj

¹ Persono kiu estas dungita por labori en oficiala servo super la leĝa nombro da oficistoj.

² Franca vorto: veturilo kun unu sola ĉevalo



*chars-à-bancs*³, nun kun dek tri plenkreskuloj kaj unu infano, kaj de kaleŝoj por tri personoj, nun kun kvin personoj kun ĉapelskatolo, kvan-kam mi devas diri, ke la plej multaj el tiuj veturiloj jam estas maljungataj en la urbo.

Tiel okazis, ke, se ni tri trairus la arbarpordego, ni necese renkontus ilin sur ilia returnvojo: la malgrandajn butikistojn kun iliaj lon-gaj frakmanikoj, la longbaskulojn, la librote-nistojn kun orekvatfloketoj, la altĉapelulojn, la longkorpu-lojn, k.t.p. kaj kvazaŭe anoncis la alvenon de la notarioj, la fabrikestroj, la librovendistoj, la kuracistoj, la apotekistoj, la floristoj, la frati-noj kaj la fratoj k.t.p., kiuj estis ankoraŭ malantaŭ ni.

"Kiel malmulte laŭmodaj ĝenerale aspektas viaj samurbanoj!" diris Nurks kun la speciala rido, kiun la angloj nomas *sneer*, interrompante tre agrablan kaj viglan konversacion, sedj tuj reprenante ĝin por malebligi min respondi.

Preteririnte kelkajn arbojn, li faris al mi la saman friponaĵon per la ekkrio:

"Kaj mi pensis, ke estas tiom da *beau monde*⁴ en via mennista⁵ Harlemo!" Kaj denove li ne permesis al mi rimarki, ke la tuta digna meza klaso troviĝis ankoraŭ malantaŭ nia dorso kaj nur horon poste estis sekvota de la altaj oficistoj kaj tiam de la alta mondo. Cetere li sciis tion same tiel bone kiel mi.

Ni eksidis ĉe Stoffels. La malafablaĵoj, kiuj ĝis nun estis direktata nur al ni ambaŭ, estis nun disponigataj al ĉiuj. Mi ankoraŭ ne sidis, kiam Nurks ekkriis, tiel ke ĉiuj najbaroj kompanioj povis aŭdi tion:

"Kara ĉielo, Hildo, kiel belan veŝton vi surhavas: mi ankoraŭ ne vidis ĝin. Domaĝe, ke ĝia fasono malfruas kelkajn sezonojn!"

La sentaŭgulo estis klare rimarkinta, ke mi surmetis ĝin unufoje kaj rigardis ĝin de tempo al tempo kun granda plezuro. Tuj mi metis miajn piedojn sub la tablon, ĉar jam okazis almenaŭ sepdek-kvinfoje, ke li, rigardante kun levita nazo la pintojn de miaj ŝuoj, demandis al mi: "Kie do vi farigis tiujn torftretilojn?"

Pri bona krisphara hundo, kiun maljunulo karesis kun multa amo, li komentis: "Kia bubaĉo!" Pri paro da blankaj ĉevaloj, kiuj haltis antaŭ la pordo, kaj kiujn la proprietulo rigardis kun multa plaĉo, li diris: "Kiaj mal-belaj kapaĉoj!" Kaj pri la infano kun la krur-apogiloj, kiu promenadis jam ekde la deka kaj duono kaj aspektis tute varmigita: "Se mi havus unu tian, mi ligus ŝtonon je lia kolo." Li diris ĉion sufiĉe laŭta por esti komprenata de la respektivaj posedantoj de la hundaĉo, de la malbelaj ĉevalkapoj kaj de la juna infano.

Belstatura viro, kies feliĉeco estis duone malaperinta, ĉar, dezirante rigardi la florojn en la 'Ornamaĵo de Flora', li iel alkrociĝis je najlo kiam li enrampis la malgrandan varmdometon. Li tiam ne atentis pri tio, sed trankvile sidante kaj fumante cigaron en 'La Arbaro', li malko-vris dum siaj pripensoj rektangulan ŝiron en sia nova pantalonoproksime de dekstra genuo. Tuj kiam li vidis ĝin, li lerte ĵetis sian silkan poŝtukon sur ĝin, sed tro malfrue por povi eviti akran rimarkon de Nurks, kiu sammomente diris al ni:

"Mi ja ŝatas tian lunlumeton."

La floramanto ruĝiĝis kiel *Cactus Speciosa*, kaj por kaŝi tion li kaptis sian naztukon por purigi sian nazon, tiel ke la luneto subite denove trarompis la nubojn, je la granda gajeco de kompanio de amsterdamaj fraŭlinoj kaj sin-joroj el butiko de manufakturaĵoj, kiuj en tiu rimarkinda tago prenis sin almenaŭ por ĉambristinoj kaj ĉambristoj de Lia Moŝto la reĝo.

"Ĉu tiu frako apartenas al via patro?" demandis Nurks ŝercante al la junulo, kiu alportis lian limonadon kaj vaste moviĝis en tiu vestaĵo.

"Mi ne havas patron," respondis la malriĉa junulo, kaj tio tranĉis tra mia animo.

La *beau monde* aperis kun ĉiuj siaj koloroj kaj odoroj: kun siaj belaj plumoj, ŝaloj, sunombreloj, mantiloj, amazonoj, kuĉeroj, veturiloj kaj rajdĉevaloj. Mi havis la malbonan ideon antaŭdiri al Nurks, ke li vidos brilan novan ekipaĵon. Tuj

³ Veturilo kun benkoj por 12 personoj

⁴ Bele vestitaj, riĉaj homoj (pron.: bomónde)

⁵ Protestantaj adeptoj de Menno Simonsz., kies komunumo estis tre riĉa.

kiam li ekvidis ĝin, li demandis min senpacience :

"Kiam do venos la bela ekipaĵo, pri kiu vi parolis ?"

Kaj tiel li faris ĉiam novajn malestimajn rimarkojn, je la granda indigno de Boerhave, pri kiu li tamen ankoraŭ diris nenion, sed kies horloĝokatenon Nurks glacimalvarme rigardis, tiel ke Boerhave ĉiumomente povis atendi komenton kaj fine butonumis sian frakon. Mi memoras nur du malagrablojn, kiujn Nurks igis elteni al mia bona estonta kuracisto, kaj kiuj insulte rilatis nur al la fizionomio. La unua estis la sekvanta. Ni parolis pri la akcidentoj, kiuj povas okazi dum naĝado. En varma somertago estas agrable paroli pri akvo. Boerhave rakontis la interesan okazaĵon de bela sinoferado de iu naĝanto, sufiĉe ekster-ordinara por meriti ĉiujn honorajn medalojn de la 'Societo de Utileco kaj Amuzo', se tiu ĉi ne havus la regulon rekompenci nur tiujn kiuj *ne* povas naĝi, sed tamen sufiĉe eksterordinara por ekardigi ŝtonmalvarman koron. Nurks tamen aŭskultis ĝin kun la plej perfekta indi-ferenteco, kaj faris jam dum la rakonto diversajn ĝenantajn rimarkojn. Jen ekzemple li amuziĝis farante artecajn ringojn de tabak-fumo, jen li blovis, kun la sinteno de iu kiu enuas, la cindrojn de sia genuo kaj eĉ de la tablo, jen li ŝajnis dediĉi sian tutan atenton kaj intereson al sia ankoraŭ ĉiam malsana kolumo, kiu ankoraŭ ĉiam suferis atakojn de sveno. Tiu multflanka ekzercado en la daŭro malmulte plaĉis al mia ekscitita amiko, kiu ardis kvazaŭ en ekstazo. Li estis same tiel malbonŝanca kun la tute nova anekdoto pri tri lejdanoj⁶, pri kiu la antaŭan vesperon mi ridis preskaŭ kun larmoj kaj mia tuta familio estis en granda danĝero sufokiĝi per nia varma pano, sed tute malsuk-cesis pro la ŝtala nefleksebleco de mia sinjoro kaj kuzo. Ĉiufoje li falis en alian ekstremon. Li tre atente aŭskultis la ŝercon kaj eĉ tiel streĉe, ke li ne aŭdis, ke la rakonto finiĝis kaj li ankoraŭ ĉiam atendis la ŝercan finon, kiun, se juĝi laŭ la esprimo de lia vizaĝo, devis ankoraŭ veni. Tamen mi poste eksciis el certa fonto, ke mia kara kuzo ankoraŭ la saman vesperon rakontis la noblaniman homsavon kaj la kazon de la tri lejdanoj en la diliĝenco kun videblaj signoj de plaĉo ; tute kiel li rakontis ilin ĉe sia tablo dum kunveno de 'Doctrina' kaj en la Munt en la daŭro de la semajno dum du koncertoj kaj en kvin kafejoj (tiel ke mi prave supozas, ke per ili li vigligis la korojn

de la *liplap*-oj kaj bluhaŭtuloj⁷. Kaj al ĉiu kiu ne trovis la unuan miriga kaj la duan ridegiga, li tuj sciis diri ion akran rilate al la delikataj punktoj de la vangharoj aŭ kravatoj.

Hildebrand (daŭrigota)

Aktivaĵoj de la **Limburga Esperanto-Asocio**

Estintaj aktivaĵoj en januaro kaj februaro 2014

Ĵaŭdon, la 30-an de januaro :

Pieter Jan Doumen prelegis pri la malkovro de la Arkeo de Noa sur la monto Ararato far rusaj pilotoj en 1917. Ok esperantistoj atente aŭskultis la prelegon.

Ĵaŭdon, la 27-an de februaro :

Ben Indestege kaj lia edzino Ĥati rakontis kaj montris lumbildojn pri sia vojaĝo tra Ekvadoro (Sud-Ameriko). Nur kvar geesperantistoj atente aŭskultis ilian interesan vojaĝraporton.

Estontaj aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2014:

Ĵaŭdon, la 27-an de marto 2014::

An Olijslagers prelegos pri siaj provo kontakti per komputilo *locked-in persons*, t.e. personoj kiuj ne povas havi kontakton kun la ekstera mondo.

Ĵaŭdon, la 24-an de aprilo 2014:

Henri Schutters gvidos kvizon pri ĝeneralaj temoj.

La kunvenoj de L.E.A. okazos ĉiun lastan ĵaŭdon de septembro ĝis julio (escepte de decembro) je la 20h00 en la Kultura Centro 'het Poorthuis', Zuidervest 2A, 3990 Peer. Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj.

⁶ Loĝantoj de Lejdeno, fama universitata urbo.

⁷ Liplap-oj: moka vorto por homoj de miksitaj raso;

bluhaŭtuloj: moka nomo por homoj kun malhela haŭtkoloro.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (9) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantio:
- Hungario: ‘Amplifiki’ denove en koncerto (*Lázlo Silvási*)
- Belgio : Tago de la Flandraj Ardenoj (*Piet Glorieux*)
- Paĝo 5
- Nederlando : Mesaĝo de nia prezidanto (*Mark Fettes*)
- Francio : Programo de Kastelo Greziljono
- Japanio: Mesaĝo al la Virina Tago 2014 (*Yosida Mariko*)
- Paĝo 6 :
- Usono : Esperanto en la usonaj lernejoj
- Salvestroloj: bona paŝo antaŭen! (*W.J. Duckaert, ‘Maar natuurlijk!’*)
- Paĝo 8 : Nia rakonto: Malagrabla viro (3) (*Hildebrand*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (LEA)
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.